



Site internet : <http://www.esperanto-france.org/49>

Courriel : esperanto-angers@wanadoo.fr

Les activités

Les Angevins ont participé à plusieurs rencontres depuis avril, citons :

- Le Congrès National d'Espéranto-France à Bourg-en-Bresse, du 25 au 29 mai.
- Le Congrès International de SAT à Chatenay-Malabry du 21 au 28 juillet.
- Le Congrès de Eŭropa Esperanto-Unio à Maribor (Slovénie) du 28 juillet au 4 août.
- La rencontre avec le groupe d'espéranto de Veszprém (Hongrie) du 17 au 21 août.

Nous reparlerons plus tard de ces rencontres.

Aktivajoj

La Anĝevanoj partoprenis plurajn renkontiĝojn de post aprilo, jen :

- La Nacia Kongreso de Esperanto-France en Bourg-en-Bresse, 25an – 29an de Majo.
- La Internacia Kongreso de SAT en Chatenay-Malabry, 21an – 21an de Julio.
- La Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Mariboro (Slovenio) 28an de Julio – 4an de Aŭgusto.
- La renkontiĝo kun la esperanto-grupo de Veszprém (Hungario), 17an – 21an de Aŭgusto.

Ni poste pridiskutos tiujn renkontiĝojn



Notu :



Séance pour la présentation de l'espéranto et des cours :
le **mercredi 12 septembre**, à 18 h. 30, à l'Institut Municipal.

Nia Generala Kunveno (kaj Reĝokuka gustumado) okazos
la **1-an de marto 2008**, en kulturcentro Jean-Vilar.



Anniversaire

L'Espéranto a 120 ans.

Un jour de juillet 1887, sortait d'une imprimerie de Varsovie, une brochure de quarante pages, rédigée en russe mais qui avait pour titre "Internacia lingvo - Antaŭparolo kaj plena lernolibro por rusoj" et qui coûtait quinze kopecks.

Elle était signée d'un mystérieux Doktoro Esperanto, pseudonyme de son auteur, jeune médecin oculiste, Lazare-Louis Zamenhof.

La brochure contenait un vocabulaire de base et les règles de grammaire d'une langue alors connue de son seul initiateur.

Qui alors aurait pensé parier sur l'avenir d'un projet contenu dans la modeste brochure d'un inconnu ?

On sait cependant ce qu'il en advint : malgré les oppositions, les préjugés (malheureusement encore vivaces), les persécutions des régimes totalitaires, le manque de moyens, le projet est devenu une langue vivante, apprise sur cinq générations, par des millions de gens, une langue utilisée dans tous les domaines et qui a généré déjà une vaste littérature traduite et originale.

- En 2008, ce sera le centième anniversaire de l'association universelle d'espéranto (UEA) et le congrès mondial d'espéranto aura lieu à Rotterdam, où se situe le siège de cette organisation.

Datreveno

Esperanto estas cendudekjara

Ium tagon de julio 1887, presejo de Varsovio liveris kvardekpaĝajn broŝurojn titolitajn "Internacia lingvo - Antaŭparolo kaj plena lernolibro por rusoj", kiuj kostis 15 kopekojn.. Ĝi estis subskribita de mistera Doktoro Esperanto, pseudonimo de ĝia aŭtoro, juna okulista kuracisto, Lazaro-Ludoviko Zamenhof.

Tiu broŝuro entenis bazan vortaron kaj la gramatikajn regulojn de lingvo tiam konata nur de la sola iniciatoro.

Kiu tiam estus pensinta veti pri la estonto de projekto entenita en la modesta broŝuro de nekonatulo ?

Tamen oni fine scias kio okazis : malgraŭ la kontraŭstaroj, la antaŭjuĝoj (bedaŭrinde ĉiam aktualaj), la persekutoj de la totalismaj reĝimoj, la manko de rimedoj, la projekto iĝis vivanta lingvo, lernita, en kvin generacioj, de milionj da homoj, lingvo uzita en ĉiuj fakoj kaj kiu naskis jam vastan literaturon tradukitan kaj originalan.

- En 2008, estos la centa datreveno de Universala esperanto-asocio (UEA) kaj la monda kongreso de esperanto okazos en Roterdamo, kie situas la sidejo de la organizaĵo.

- En 2009, nous célébrerons le 150^e anniversaire de la naissance de Zamenhof, en 1859. Comment marquer cet événement ? Il est déjà temps d'y penser...

André Frangeul

Un autre anniversaire

Antoni Grabowski

Le premier qui dialogua en espéranto avec Zamenhof

Un jour de 1888, un homme frappa à la porte du Dr Zamenhof et lui adressa la parole en espéranto. Il se présenta : Antoni Grabowski, ingénieur chimiste.

Zamenhof diffusait sa brochure "Internacia lingvo" depuis quelques mois seulement et ce fut sans doute le premier dialogue dans la nouvelle langue.

Grabowski était né en 1857, dans la partie de la Pologne administrée par la Russie, comme Zamenhof.

Outre une intense activité professionnelle, il ne cessa d'œuvrer pour le développement du mouvement espérantiste.

Extraordinaire polyglotte, dès 1913, il traduisit dans "Le Parnasse des peuples", des poèmes de 30 pays, et la même année, fit une traduction de l'épopée polonaise "Pan Tadeusz".

On lui doit aussi notamment, les traductions en espéranto de "Mazepa", un drame de Slowacki, joué au congrès d'espéranto de Cracovie en 1912 et de l'opéra "Halka" de Moniuszko.

Grabowski mourut subitement sur un trottoir, en 1921, devant une vitrine de librairie exposant des livres d'espéranto...

André Frangeul

- En 2009, ni celebros la centkvindeka datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, en 1859. Kiel marki tiun okazaĵon ? Estas jam la tempo pripensi la aferon...,

André Frangeul

Alia datreveno

Antoni Grabowski

La unua kiu dialogis en esperanto kun Zamenhof

Iun tagon de 1888, homo frapis je la pordo de Dr Zamenhof kaj alparolis lin en esperanto. Li prezentiĝis : Antoni Grabowski, inĝeniero pri kemio.

Zamenhof dissendis sian broŝuron "Internacia lingvo" de post nur kelkaj monatoj kaj tio estis verŝajne la unua dialogo en la nova lingvo.

Grabowski naskiĝis en 1857, kaj kiel Zamenhof, en la parto de Polio estrita de Rusio.

Krom intensa profesia agado, li ne ĉesis labori por la disvolviĝo de la esperantista movado.

Eksterordinara poligloto, jam en 1913, li tradukis en "la Parnaso de popoloj", poemojn el 30 landoj kaj, saman jaron, faris tradukon de la pola epopeo "Sinjoro Tadeo".

Oni ŝuldas al li, interalie, la tradukojn en esperanto, de "Mazepa" dramo de Slowacki, prezentita dum la kongreso de esperanto de Krakovio, en 1912 kaj de la opero "Halka" de Moniuszko.

Grabowski subite mortis, en 1921, antaŭ montrofenestro de librejo eksponanta esperantajn librojn...

André Frangeul

Ni ludis

N^o 2

1	AKUPUNKTUR	A	AKUMULATOR
2	KALORIO - GI	B	KAMARAD - PA
3	UM - ENTJERO	C	UL - RIZEJOJ
4	MARTO - OK	Ĉ	POETO - LAND
5	URIO - IT - LI	D	URNO - LIM
6	LAZ - LA - KAT	E	NIT - IAL - ZN
7	ADELILAND	F	KOJOT - ABAT
8	JAM - BE	G	EK - KNEDI
9	OPON - ZADIG	Ĝ	UGR - LAD - IN
10	RAJDANTINO	H	RIOLIT - AGO



Inda retpaĝo

➤ **Monata gazeto redaktita de László Pásztor :** <http://kiralylajos.extra.hu> Tiu informilo de Miskolc urba "Király Lajos" Esperanto Amika Rondo entenas po-monatajn gazetojn dulingvajn, kiuj estas tre agrable legindeblaj.

En la Aŭgusta revuo, oni parolas pri la vino "Tokaj".



Funebro en nia esperantista familio

La 12an de julio, forpasis nia amiko Henri Chesnot, de Saint-Lambert-la Potherie.

Henri Chaisnot, de longa tempo, estis tre aktiva en la asocio de la esperantistaj radioamatoroj.

Ni esprimas nian kondolencon al lia familio.